BUGA–ekskurso 2009

Kvankam ni multege varbis kaj en Berlino kaj en Brandenburgio kaj pluraj anoncis sian emon kunvojaĝi al Schwerin por ĝui Esperanto-gvidadon tra la Tutgermana Ĝardena Ekspozicio, nur alvojaĝis kvin gesamideanoj. Tamen nia mendita gvidanto Franz-Peter Kurtz el Schwerin akceptis nin tre afable kaj komprenis, ke ni estas tro malmulte da homoj por transpreni la kostojn por la gvidado. De li ni ricevis niajn enirbiletojn kun mapo kaj faldfolio pri Schwerin. Post adiaŭo de la gvidanto ni memstare vagadis tra la sep ĝardenoj enmeze de la urbo. Multan dankon de ĉi tie al Franz-Peter.

Thomas Würfel jam dum la trajnvojaĝo bone preparis nin pri la historio de Schwerin kaj de la ĝardenaj ekspozicioj de Germanio. Pro tio ni jam iomete sciis, kio atendos nin.

Je nia alveno la vetero pli kaj pli boniĝis kaj baldaŭ regis sunbrilado. En la sunbrilado la interesa kaj pitoreska kastelo de Schwerin, kiu bone integriĝis en la ekspozicion, aspektis kvazaŭ palaco el fabelo. En tiu konstruaĵo nuntempe estas la sidejo de la parlamento de la federacia lando Meklenburgo-Antaŭpomerio.

Ĉar ĉiuj ĝardenaj partoj situis en komuna teritorio, ĉiuj estis atingeblaj piede. Ene de ok horoj ni sukcesis viziti ĉiujn vidindaĵojn kaj eĉ havis iomete da tempo por ripozi kaj ĝui trankvilajn lokojn, ekzemple ĉe la „Nazo de Adebar“, kie kreskis multaj orkideoj. Interesaj kulminoj estis apud la kastelo la kuireja ĝardeno, la ekspozicio de tomboŝtonoj, la halo de floroj kaj eĉ la malgranda heĝa labirinto kaj fine ankaŭ la elaera rigardo sur la tutan federacian landon.

Entute la vizito de BUGA estas valora travivaĵo kaj nepre rekomendenda. Pli bone memkompreneble estus, se ni povus estis kune kun la amikoj de Meklenburgo-Antaŭpomerio, sed ni faris la plej bonan el tiu tago.

Ronaldo